

www.planlingvoj.ch

KOMENTOJ KAJ KOMUNIKOJ 2017

Komento pri:

http://www.linguistic-rights.org/stefano-keller/Forumo_pri_Minoritatoj_10a_sesio_interveno_Stefano_Keller_UEA_UN_Ghenevo_30nov2017.pdf

Ĉi tiu deklaro enhavas sennombrajn (praktike en ĉiu frazo) dubindajn asertojn, "alternativajn faktojn", legendojn, fantaziojn, stereotipojn kaj kontraŭdirojn de la malnova Eo-propagando. Probable neniu plu en la mondo kredas tiujn fabelojn.

Laŭ mi estus tempo ŝanĝi tiujn iluziaĵojn favore al pli realismaj pritaksoj kaj konkludoj.

aK, dec. 17

www.planlingvoj.ch

POLA kuracisto malaperis sur esperanto.pl

Tre interese: La vorto "pola" [kuracisto] malaperis el la unua paĝo de la retujo esperanto.pl. Ĉu tiu forigo okazis post mia publika interveno de la 11a de novembro, ne estas klare. (Mi neniam ricevis iun ajn reagon el Pollando rilate al tiu ĉi temo, kvankam s-ro Zdechlik, prezidanto de PEA, en iom malvarma tono skribis al mi, ke miaj retmesaĝoj estas konsiderataj kiel spamo, se ili ne strikte koncernas polajn aferojn).

Al la pruvo, ke la vorto "pola" estis aldonita en la unua versio, servas la bildigo de la malnova versio de la koncerna retpaĝo, kiu estas konservata sur http://www.planlingvoj.ch/Esperanto_Polen.pdf, p. 192. Do, oni ne povos mensogi, nek kaŝi ion ajn.

Intertempe mi tie aldonis la korektitan version por dokumenti la ŝanĝon.

Estas bedaŭrinde, ke al tiuj esperantistoj komplete mankas sincereco kaj honesteco, ĉar ili daŭre prisilentas, ke Zamenhof estis juda kuracisto. KAJ LI ESTIS NUR JUDA, nenio alia. Certe li ne estis POLA. Li estis pli proksima al RUSA ol al POLA (kion la polaj esperantistoj kompreneble ankaŭ prisilentas).

aK, dec. 17

www.planlingvoj.ch

POLA kuracisto malaperis sur esperanto.pl

Tre interese: La vorto "pola" [kuracisto] malaperis el la unua paĝo de la retujo esperanto.pl. Ĉu tiu forigo okazis post mia publika interveno de la 11a de novembro, ne estas klare. (Mi neniam ricevis iun ajn reagon el Pollando rilate al tiu ĉi temo, kvankam s-ro Zdechlik, prezidanto de PEA, en iom malvarma tono skribis al mi, ke miaj retmesaĝoj estas konsiderataj kiel spamo, se ili ne strikte koncernas polajn aferojn).

Al la pruvo, ke la vorto "pola" estis aldonita en la unua versio, servas la bildigo de la malnova versio de la koncerna retpaĝo, kiu estas konservata sur http://www.planlingvoj.ch/Esperanto_Polen.pdf, p. 192. Do, oni ne povos mensogi, nek kashi ion ajn.

Intertempe mi tie aldonis la korektitan version por dokumenti la ŝanĝon.

Kompreneble al tiuj esperantistoj komplete mankas sincereco kaj honesteco, ĉar ili daŭre prisilentas, ke Zamenhof estis juda kuracisto. KAJ LI ESTIS NUR JUDA, nenio alia. Certe li ne estis POLA. Li estis pli proksima al RUSA ol al POLA (kion la polaj esperantistoj kompreneble ankaŭ prisilentas). PS Intertempe, mi ricevis mesaĝon el PL, en kiu oni konfirmis, ke la forigo de la vorto "pola" okazis reage a mia interveno. Krom tio oni klarigis al mi, ke "por ni esperantistoj [Zamenhof] estis ne judo, ne polo, ne ruso, ne litovo sed li estis esperantisto".

aK, dec. 17

www.planlingvoj.ch



The screenshot shows the website of the Pola Esperanto Asocio (PEA) / Polski Związek Esperantystów. The main heading is "Kio estas Esperanto?". The text on the page includes:

- Esperanto** estas la internacia lingvo, kiun kreis la kuracisto **Ludoviko Zamenhof**. La nomo "Esperanto" devenas de pseŭdonimo, per kiu Zamenhof publikigis sian "Unuan Libron" en la jaro 1887. En ĉi tiu libro, la kreinto prezentis la bazon de la lingvo en 16 gramatikaj reguloj.
- Esperanto estas bazita sur indoeŭropaj lingvoj. Dank' al reguleco kaj facileco de gramatiko, ĝi estas pli facila ol aliaj lingvoj.
- Zamenhof kreis neŭtralan lingvon por la internacia komunikado, por amikeco kaj paco. Li ne volis, ke Esperanto eliminu la naciajn lingvojn, sed estu la helpa lingvo.
- Esperanto de 1887 (ĝis nun nature evoluis, sed kun netuŝebleco de fundamento, pri kiu skribis Zamenhof en "Fundamento de Esperanto".
- Esperanto posedas riĉan originalan kaj tradukitan literaturon.
- La ĉefa tutmonda esperanta organizaĵo estas la Universala Esperanto Asocio, kiu estis fondita en la jaro 1908.
- La plej grandaj kampanjoj de esperantistoj estas Universalaj Kongresoj de Esperanto kiuj okazas ĉiujare en alia lando. La unua okazis en franca urbo Boulogne-sur-Mer en la jaro 1905.
- Symboloj de Esperanto: flago kaj stelo.** La verda simbolas la esperon, la blanko la pacon kaj neŭtralecon, la kvinpinta stelo la kvin kontinentojn. Esperantistoj havas propran himnon "La espero" (Nadzieja). Vortojn de la himno *strebis kolekti* Zamenhof

ZAMENHOF DENOVE POLA KURACISTO!

Estas nekredible!!!

Mi ne kredis miajn okulojn, kiam sur la relanĉita retpaĝaro de PEA (esperanto.pl) mi legis nigre sur blanke:

Esperanto estas la internacia lingvo, kiun kreis la **pola** kuracisto Ludoviko Zamenhof.

Post multjaraj klopodoj (ne nur de mia flanko) por elsarki tiun duonveron (fakte mensogon) kaj por klarigi, ke kaj kial Z ne estis polo, mi konstatas, ke tiuj klopodoj estis tute vanaj kaj komplete fiaskis. La polaj esperantistoj do insistas, ke Zamenhof estu pola kuracisto, do polo. Bone, ili insistu. Ajna kroma komento superfluas.

aK, nov. 17

www.planlingvoj.ch



Pri la enhavo de la revuo Esperanto (UEA) oni povas nur komenti:

Ege stranga enhavo.

Sed ĉar temas pri stranguloj, kiuj diktas la tonon en UEA, tio ne estas miriga. Mi do daŭre rezignos pri abonado, ĝis kiam tiu kompatinda revuo proponos ion vere interesan por legi.

La samo cetere validas por la Ondo.

Tiel longe, ke en tiu revuo aperas stultaĵoj kiel [Silfer persvadis la naturamikan mondkongreson](#), kiujn oni konsideras gravaj kaj priraportindaj novaĵoj (kvankam tiuj kongresoj kaj organizaĵoj kun siaj malgrandaj membronombroj estas komplete sensignifaj), neniu serioza (kaj eĉ malserioza) esperantisto emos aboni ĝin.

Sed ĉar oni havas nenion pli interesan kaj pli inteligantan por publikigi, oni dependas de tia fatraso, kiun oni simple kopias el aliaj, eĉ pli idiotaj novaĵagentejoj (kvankam oni ja scias, ke temas pri idiotaĵo). Sed mi suspektas, ke ĉiuj homoj, kiuj redaktas tiujn revuojn kaj kontribuas al ili, suferas je la samaj Esperanto-malsanoj.

Kvankam oni avertas pri tiuj problemoj dum jaroj, nenio principe ŝanĝiĝis. Tiuj revuoj kaj agentejoj, kiuj plene dependas de unuopaj aktivuloj, aperos verŝajne ĝis kiam tiuj aktivuloj fizike aŭ mense ne plu povos, post tio ili probable malaperos - por ĉiam, ĉar ili ne havos posteulojn, kiuj volus okupiĝi prie (jam ekonomie tio ne indus kaj eblus, ĉar mankas abonantoj). Almenaŭ en la kazo de HeKo neniu bedaŭros ĝian malaperon, el kiu stulte ĉerpas en principo seriozaj revuoj, dum ja oni povus bedaŭri la

malaperon de la Ondo (kiu kiel papera eldono jam malaperis, kiel unua ŝtupo de ĝia totala kaj definitiva malapero).

aK, okt. 17

www.planlingvoj.ch

“Reĝo Parzival” reviviĝis

Kiel oni vidas en la suba kalendaro de Svisa Esperanto-Societo, "Reĝo Parzival" reviviĝis kaj repopulariĝis en Svislando. Ĉe tiu ĉi persono temas pri la plej kurioza esperantisto kaj Esperanto-propagandisto de Svislando.

Pri kia tipo de esperantisto temas, legeblas en Svisa enciklopedio planlingva (libro strikte ignorata kaj subpremata de ĝiaj eldonistoj Svisa Esperanto-Societo kaj CDELI)

http://www.planlingvoj.ch/28_ENCYCL_ESPERANTO_R.pdf (Serge Reverdin)

Certaj "gvidaj" svisaj esperantistoj verŝajne atingis tiel altan gradon de stulteco, ke ili nun prezentas lin en ĉiuj eblaj kanaloj, ankaŭ sub <https://www.kickstarter.com/projects/415663349/svisa-espero-sommerausgabe-2017>

Ĉi tiu ekzemplo montras, kiujn dubindajn prioritatojn la svisa Eo-movado elektas.

aK, sept. 17

www.planlingvoj.ch

Kalendaro SES Septembro 2017

14-an de septembro 2017, 16h00. Bielo en Migros-Restoracio Kreuzplatz: **Ronda Tableo de la Mondregistaro - Kreado de Espero-mono kun Parzival'**

14-an de septembro 2017, 20h00, La Chaux-de-Fonds, Tour Espacité, 14e étage, restaurant Citérama: **Café des Langues - renkontiĝejo por geparolantoj de plej diversaj lingvoj**

18-an de septembro 2017, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: **Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn**

21-an de septembro 2017, 16h00. Bielo en Migros-Restoracio Kreuzplatz: **Ronda Tableo de la Mondregistaro - Kreado de Espero-mono kun Parzival'**

~~23-an de septembro 2017~~:-La anoncita studsabato estas postigita al la 30-a de septembro okaze de la Solenaĵo 60-jariĝo de CDELI

25-an de septembro 2017, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: **Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn**

28-an de septembro 2017, 16h00. Bielo en Migros-Restoracio Kreuzplatz: **Ronda Tableo de la Mondregistaro - Kreado de Espero-mono kun Parzival'**

28-an de septembro 2017, 20h00. Zuriko en Kafejo Mandarin (apud Stacidomo Stadelhofen): **Libera kunveno kaj kafoklaĉo**

29-an de septembro 2017, 19h00, Vouvry, ĉe Clea Robin, ch. de Culat 20: **Babila rondo de la orienta grupo de Laŭzana Esperanto-Societo** (024 481 33 06 / 079 330 04 03)

**Naivaj esperoj kaj troa entuziasmo de esperantistoj finiĝis en administra fiasko:
La propono de M. Grosjean rilate la akcepton de Esperanto kiel nemateria
kulturheredaĵo de Svislando ne trovis aprobon de la svisaj instancoj**

En la aprila numero de *Esperanto* (UEA) Mireille Grosjean utiligis preskaŭ unu tutan kaj vanan paĝon por abunde skribi pri la temo de la mondaj heredaĵoj de Unesko (kiuj eĉ ne koncernas Esperanton) kaj por diskonigi al la legantoj kun granda bruo sian projekton de la akceptigo de Esperanto kiel nemateria heredaĵo de Svislando. Ŝi referencis al analoga projekto en Pollando, kiu havis sukceson kaj estis aprobita en 2014 de la tiera ministro de la kulturo. Analogan ekzercon Grosjean, volis, nome de Svisa Esperanto-Societo (kun sidejo en La Chaux-de-Fonds), konduki al sukceso ankaŭ en Svislando en 2016/17, tra la kantonon Neuchâtel. Kiel ŝi notis en la koncerna artikolo, tiu ĉi kantonon eĉ konfirmis, ke ĝi akceptis la proponon de SES (kiel reprezentanto de la ĝenerala civilsocia publiko, kiu rajtas fari tiajn proponojn), kaj ke ĝi plusendis ĝin al la centra administracio en Berno, kiu devis decidi en la nomo de Svislando.

En julio 2017 la koncerna administracio (Svisa oficejo pri kulturo kadre de la Ministerio pri internaj aferoj) publikigis la aktualan (kaj definitivan) liston de la nuna aktualigo sub <http://www.bak.admin.ch/kulturerbe/04335/04341/05708/index.html?lang=de>.

Videble, Esperanto mankas en tiu ĉi listo (kiel mi anticipe prave supozis, ĉar la propono de SES ne konformis al la kriterioj).

Laŭ demando de la 20a de septembro 2017, la koncerna administracio respondis la postan tagon, ke la propono de SES ne povis esti akceptita, ĉar ĝi efektive ne konformis al la kriterioj de Unesko (laŭ art. 2 de la koncerna konvencio), kiu ne konsideras lingvojn en si mem kiel nemateriajn kulturheredaĵojn. Kiel la kunlaboranto de tiu administracio (Svisa oficejo pri kulturo) aldone klarigis, lingvoj ja povas en escepta kazo esti akceptitaj kiel nemateria heredaĵo, se ili estas ligitaj kun specifaj parolaj tradicioj kaj popolaj esprimformoj aŭ kiam lingvo funkcias kiel portanto de specifa popola kant- aŭ rakont-tradicio). Similaj kriterioj evidente ludis iun rolon en la pola kazo, dum ili evidente ne koncernis la svisan kazon. En Svislando ekzemple ankaŭ la retoromanĉa lingvo kiel tia ne estas konsiderata kiel nemateria kulturheredaĵo.

Do, ŝajnas, ke la svisaj (neuŝatataj) iniciatoroj de tiu propono unue ne ĝuste komprenis la esencon de nemateria kulturheredaĵo laŭ la kompreno de Unesko, due ili blindigis sin per la kazo de Pollando (kie la propono estis akceptita en laŭ mi iom dubinda maniero,

vd. http://www.plansprachen.ch/Esperanto_Polen.pdf, p. 182-85.), kaj trie ili pravigis ĝin ĉe la svisaj aŭtoritatoj per maltrafaj argumentoj. En la koncerna artikolo de *Esperanto* oni povis legi jenan pravigon: „Svisa Esperanto-Societo (SES), kies sidejo estas en La Chaux-de-Fonds, en la kantonon Neuchâtel, proponis Esperanton al la kantona registaro. Argumentoj estis ne nur la sidejo de SES, sed ankaŭ la elstara kontribuo de du svisoj, Edmond Privat kaj Hector Hodler, en la vivo de nia Movado.“ Oni povas komenti, ke Edmond Privat kaj Hector Hodler, cetere ambaŭ ĝisostaj ĝenevanoj, apenaŭ povas ludi iun rolon lige kun la nemateria heredaĵo en la senco de Unesko, kaj eĉ ne koncernas la kantonon Neuchâtel mem (kvankam Privat iam loĝis kaj agadis en tiu ĉi kantonon). Do, el la vidpunkto de la decidanta komisiono, tiaj kriterioj devis esti komplete malkonformaj al art. 2 de la koncerna konvencio de Unesko. Ankaŭ la fakto, ke la formala sidejo de SES troviĝas en La Chaux-de-Fonds, ne sufiĉas kiel decida argumento (cetere, antaŭe ĝi troviĝis dum longa tempo en aliaj kantonoj, depende de la loĝloko de la oficanta prezidanto, poste ĉio koncentriĝis en La Chaux-de-Fonds resp. Les Brenets per la persona akaparado de la „povo“ fare de s-ino Grosjean, kiu diktas la tonon en tiu asocio). Eĉ ne estas klare, ĉu KCE kaj CDELI estis menciitaj en la koncerna letero (ĉar tiu informo mankas en la koncerna artikolo de *Esperanto*), kio estas iom stranga.

Post la fiasko de la instruista konferenco, kiun Grosjean pompe anoncis kaj efektivigis en Neuchâtel antaŭ du jaroj sen la kunvokitaj diplomatoj, la malaprobo de Esperanto kiel nemateria kulturheredaĵo de Svislando estas la dua granda fiasko de tiu (tro) fervora Esperanto-aktivulino, kiu sisteme troigas la povojn kaj fortojn de Esperanto kaj supertaksas la proprajn eblojn. Krom tio, la rifuzo de la propono aprobi Esperanton kiel nemateria kulturheredaĵo de Svislando estas granda bato por la movado, kiu

strebas atingi, ke Esperanto iam estu akceptita kiel monda kulturheredaĵo de Unesko, se ankoraŭ aliaj landoj aliĝos al tiu movado.

Cetere, kiel Grosjean notis en sia artikolo, la kanton Neuchâtel sendis ankoraŭ tri aliajn proponojn al Berno. Anstataŭ Esperanto, estis elektita nur la propono de la popola tradicio de *per neĝo formitaj figuroj sur la stratoj de la urbo La Chaux-de-Fonds* (vd. <http://www.arcinfo.ch/photos/regions/les-sculptures-de-neige-envahissent-la-chaux-de-fonds-390952>). Jen tio estas vivanta kulturtradicio en la senco de Unesko, kompare kun Esperanto, kiu estas (almenaŭ en Svislando elmortanta) lingvo kaj movado, kiu nek en la socia vivo de la kanton Neuchâtel nek en Svislando ankoraŭ ludas iun gravan rolon.

Al s-ino Grosjean oni do povas konsili, ke estonte ŝi konsultu taŭgajn personojn, kiuj povas kompetente konsili ŝin, se temas pri la lanĉo de grava iniciato, kiu koncernas la prezentadon de Esperanto al la „ekstera mondo“ kadre de similaj konkursoj. En alia kazo la totala fiasko estas garantiata, kiel montris la plej aktuala kazo. Por la iniciatoroj tamen restas la konsolo, ke almenaŭ la kanton Neuchâtel, kiu regule subtenas/is la ideojn de esperantistoj en sia teritorio, bonvolis akcepti ilian proponon kaj plusendis ĝin al Berno, kvankam la koncerna ŝtata komisiono decidis negative. Ili do povas esti kontentaj pri tiu simbola „kompromiso“, kiu esprimas certan aprezan valortakson de Esperanto en tiu „esperanta“ kanton (kiu eĉ portas la verdan koloron en sia flago), en kiu verŝajne nur malmultaj homoj scias, kio estas Esperanto. KCE ne plu funkcias kiel "grava" Esperanto-institucio en tiu kanton, kaj la sorto de CDELI, kiu same estis iniciato de privatuloj, ne estas certa. La kanton Neuchâtel kaj la urbo La Chaux-de-Fonds, kiuj suferegas pro manko de monaj rimedoj por financi siajn publikajn aferojn, do neniel garantias la plukezistadon de tiuj kaj tiaj privataj iniciatoj kaj institucioj, kiuj nur malofte estas utiligataj de la ĝenerala publiko. Necesas do konsideri tiujn realeaĵojn.

Auskunft des Bundesamts für Kultur (Bern) vom 21.9.2017 (auf Anfrage vom 20.9.):

„Es ist tatsächlich so, dass «Esperanto», als Eintrag für die Liste der lebendigen Traditionen der Schweiz vorgeschlagen wurde.

Der Vorschlag wurde bei der Aktualisierung der Schweizer Liste deshalb nicht berücksichtigt, weil gemäss dem UNESCO-Verständnis (Art. 2 des Übereinkommen zur Bewahrung des immateriellen Kulturerbes) Sprachen an sich für die Listen des immateriellen Kulturerbes nicht berücksichtigt werden sollen, bzw. sich ein Eintrag in den Inventaren nur dann rechtfertigt, wenn es sich um spezifische mündlich überlieferte Traditionen und Ausdrucksweisen oder um Sprache als Träger immateriellen Kulturerbes (in Form von spezifischem Liedgut, Sagentraditionen, etc.) geht. Sie können sich vorstellen, dass andernfalls von Baskisch bis Rätoromanisch alle Sprachen der Welt einen Eintrag in die Liste für sich beanspruchen würden.“

aK, sept. 17

www.planlingvoj.ch

Esperanto-gazetoj povas libere publikigi tiun ĉi komunikon.

Membroŝrumpo endanĝerigas la pluan ekziston de UEA

Komento pri:

<https://groups.yahoo.com/neo/groups/komitato-de-uea/conversations/messages/10539>

La kvanto de 3000, 4000 aŭ 5000 UEA-membroj interesas neniun, kaj anonimaj statistoj havas neniun utilon kaj sencon por Esperanto, ĉar tiuj membroj ĝenerale produktas neniujn kulturajn valorojn por Esperanto (kun la escepto de kelkaj raraj konataj unuopuloj - la samaj de jardekoj). Tia organizaĵo devus havi minimume cent mil, prefere kvincent mil aŭ kelkajn milionojn da membroj por ludi iun

rolon, havi iun signifon kiel intereso- au premgrupo kaj esti iom grava en la ekstera mondo. En Svislando ĉiu iom grava socia organizaĵo havas pli ol dek mil membrojn.

En la pasintaj jaroj UEA ne sukcesis konsiderinde altigi sian membrokvanton, sed male, la membraro tendencas ŝrumpi, kio devas esti konsiderata kiel kompleta malkapablo kaj totala fiasko de la estraro, malgraŭ grandbuŝaj promesoj kaj megalomaniaj strategiaj planoj, verkitaj de homoj en la akademia eburturo, kaj malgraŭ la anoncado fare de iuj interretaj fantaziuloj, ke centmiloj da homoj lernas Esperanton per interretaj kursoj (povas esti, sed kie tiuj kursanoj fizike estas?). Ĉio tio estas groteskaj troigoj kaj propagandaj blufoj de homoj, kiuj volas ludi iun gravan rolon, kvankam ili estas sensignifaj figuroj. Mi rekomendas al la Eo-movado rekomenci tute modeste ĉe la nulo kun tute aliaj prioritatoj, kaj aliaj homoj. Sed tiaj homoj ne estas videblaj, ĉar la problemo de la Eo-movado estas, ke ĝi reproduktas samtajn homojn inter la novuloj, kiuj ofte estas eĉ pli realecfemdaj, naivaj kaj infanecaj ol iliaj antaŭuloj, inter kiuj tamen ekzistis kelkaj seriozaj homoj, kaj en oriento kaj okcidento. Sed la Eo-movado sisteme kaj obstine ignoras bonajn konsilojn de kritikistoj (kiuj estas misfamigitaj kiel perfiduloj kaj malpurigantoj de la nesto), preferante idiotojn, kiuj elpuŝas altgrade skurilajn stultaĵojn, remaĉitajn en la ĉefaj paroliloj de la Eo-gazetaro kiel la revuoj *Esperanto* (UEA), *Ondo de Esperanto*, *Literatura Foiro* kaj *Libera Folio*, kiuj okupiĝas preskaŭ nur pri sensencaj temoj, kiujn ili konsideras gravaj en sia alternativa paralela mondo de la subtera Eo-movado, kiun krom kelkaj hieraŭaj komunistoj neniu plu serioze konsideras.

aK, sept. 17

www.planlingvoj.ch

Komento pri la rezolucio „daŭripova turismo“

Same kiel en la kazoj de la historio de la „monda paco“, de la „solvo de la internacia lingva problemo“ kaj de la „homaj rajtoj“, en kiuj la Esperanto- (t.e. UEA-)movado faris **neniun konkretan kontribuon**, ankaŭ en la kazo de la „daŭripova turismo“ Esperanto ludas **neniun rolon**, almenaŭ laŭ la difino de la germanlingva Vikipedio: https://de.wikipedia.org/wiki/Sanfter_Tourismus

La kriterio

knowledge of a common language in the promotion of reciprocal contacts among people of different cultures

oficiale ne apartenas al la programo pri „daŭripova turismo“ (kiu evidente forĝis la lingvan aspekton).

Laŭ la anglalingva difino de Vikipedio, la kulturo en si mem eble ludas iun gravan rolon en la koncepto de la „daŭripova kulturo“,

- informing themselves of the **culture**, **politics**, and **economy** of the communities visited
- anticipating and respecting local cultures, expectations and assumptions
- supporting the integrity of local cultures by favoring businesses which conserve cultural heritage and traditional value

(sed tiuj kriterioj evidente pli rilatas al ekonomio - kun kiu la Eo-movado havas neniun rilaton) tamen, mi ne povas vidi, ke en tiu ĉi rilato la Esperanto-movado, precipe la UEA-movado, faris iun substancan kontribuon ĝis nun. Ĝi nur opiniis, ke ĝi faris ĝin, kaj fanfaronis pri ĝi.

Ekzemple, naciaj folkloraj vesperoj dum Universalaj Kongresoj de Esperanto ne povas esti konsiderataj kiel kontribuo al la „daŭripova turismo“ sur la kampo de la kulturo. Tiuj folkloraj programoj kutime nure servas al la propagando de la ŝtato, en kiu la kongreso okazas, kaj havas supraĵan amuzan valoron por la turistoj, kiuj supraĵe konsumas tiun pseŭdokulturon, sen kontribui al ĝi kaj sen plia enprofundiĝo en la kulturon de la koncerna lando. Iujn aliajn formojn de manifestiĝo kaj flegado de la loka kulturo tiuj kongresoj ne havas, kaj laŭ mia observo la plimulto de la kongresanoj ankaŭ ne interesiĝas nek okupiĝas pri loka kulturo (ĉar ili interesiĝas unuavice pri esperant/ist/aj aferoj kaj siaj propraj turismaj bezonoj). NB Kiel konate, en Eo-medioj de tempo al tempo okazas interkonatiĝo de diverslandaj e-istoj, kiuj kondukas al daŭraj amrilatoj kaj al la fondo de internacia familio - sed eĉ tiu kultura interŝanĝo ne estas menciita en la „fakliteraturo“ kiel „daŭripova turismo“.

Ankaŭ la oficialaj dumkongresaj ekskursoj, organizitaj de la ŝtataj turismaj agentejoj (por perlabori monon, sed ne por intimigi la eksterlandanojn kun la loka kulturo), kaj en kiuj la kongresanoj partoprenas, estas la pura inverso de „daŭripova turismo“.

Se la estraranoj de UEA kaj granda parto de kongresanoj vojaĝas per aviadiloj al la koncerna kongreslando, ekzemple Koreio (nu, provu veturi tien per biciklo), kaj tranoktas en luksaj hoteloj, en kiuj ili izoliĝas de la homoj (kongresanoj kaj lokaj enloĝantoj), aŭ veturas per aŭtomobiloj tien, kion ili ja kutime faras, ili certe ne kontribuas al la „daŭripova turismo„. Same la gigantaj luksaj kongresejoj de la UK ne estas parto de la „daŭripova turismo“, sed ĉio tio estas parto de la „kruda kaj pure komerca turismo„. Ktp. ktp. La esperantistoj estas kompareblaj kun akridoj, kiuj kutimas aprubte aperi en la kongresurbo por aprubte forlasi ĝin kaj plej ofte neniam plu reveni al ĝi, krom se la kongreso okazas duan fojon en la sama urbo, kiam la sama spektaklo ripetiĝas. Tio ne estas „daŭripova turismo“.

Do, ĉar la Esperanto-movado havas praktike nenion aŭ nur tre malmulton konkretan komunan kun „daŭripova turismo„, ĉio, kion UEA ĉi-rilate disvastigas per tiaj rezolucioj, estas pura fantazio, sensencaĵo, fatraso kaj blufado, same kiel ĉio cetera en aliaj rilatoj, kion UEA produktas kaj asertas. Neniu en la mondo atribuas daŭripovon al Esperanto.

Nature, oni celis diri, ke Esperanto en si mem signifas iun valoron aŭ kontribuan al la „daŭripova evoluo“ (same kiel al la „monda paco“, la „solvo de la internacia lingva problemo“ kaj la „homaj rajtoj“), sed tiu teorio ne funkcias, ĉar temas pri puraj imagoj, iluzio, fikcio de e-istoj, kiuj estas ornamataj per fremdaj plumoj, ĉar la propra kontribuo al tiuj valoroj estas minimuma.

Ĉar „daŭripova evoluo“ (kiu rilatas ĉefe al ekologio) estas moda slogano, kiu plaĉas al instancoj kiel EU kaj Unesko, per kio oni eventuale ricevas monsubvenciojn, UEA volonte uzas ĝin en sia propagando abunde kaj redunde.

Sed kompreneble, sennombraj idiotoj kredas, kio estas skribita en tiuj (komplete sensencaj) rezolucioj.

aK, aŭg. 17
www.planlingvoj.ch

Drasta ekzemplo de altgrada esperantista naiveco kaj falsa plendo

Komento pri:

<http://www.liberafolio.org/2017/07/04/alia-universalismo/>

Ankaŭ tiu artikolo estas verkita de fantaziulo. Dum pli ol 70 jaroj la komunistoj kaj diversaj religioj eĉ pli longe predikadis pacon, amikecon kaj egalrajtecon, por samtempe per brutala perforto subpremi la popolojn, kiujn ili kaptis, posedis kaj regadis. Minimume 100 milionoj da homoj pereis sub la komunismaj reĝimoj en diversaj landoj. La homaro ne plu eltenas aŭdi kaj legi tiujn falsajn kaj hipokritajn vortojn, kiuj estis komplete diskredititaj de diversaj politikaj kaj religiaj ideologoj kaj kiujn la (iom stulta) Esperanto-movado konstante remaĉadas.

Koncerne la kulturalan hegemonion, tiu hispano purigu unue antaŭ la propra pordo. Ŝajnas, ke li ne konscias, ke ĝuste Hispanio estas unu el tiuj potencoj, kiuj trudas sian kulturon al aliaj naciaj minoritatoj. Plej multe suferas la katalunoj pro tiu centrisma madrida ŝovinismo. Pri la iama hispana koloniismo en Latinameriko, kiu kaŭzis enormajn viktimojn, ni tute ne parolu. Do, la hispana nacio mem kulpas kaj respondecas por naciismoj kaj interpopolaj streĉitecoj, por ripeti la vortojn de tiu hispana skribulo, kiu nature unuavice pensas pri aliaj, ĉefe usonanoj kaj anglalingvanoj. Do, anstataŭ disvastigi stultajn plendojn, tiuj homoj prefere komprenu kaj konfesu la propran kulpon de sia nacio, sed ĉar ili estas ideologie blindaj kaj komprenas nenion alian krom la Esperanto-propagando kaj la propagando de sia ŝtato, ili neniam faros tion.

La mondaj rilatoj neniam kontentigos la bezonojn de normalaj homoj. Oni devas esti vere naiva por mistaksi tiun problemon. La internacia lingvo Esperanto, kiu ludis kaj ludas neniun rolon en la pacigo de la popoloj, ne povos solvi ĝin. Ĉi-rilate la Eo-movado komplete supertaksis sin mem. Aliflanke, en Eŭropo estis multo pozitiva farita, ekzemple sur la kampo de la faciligo de la vojaĝado - ŝajnas, ke la e-istoj tute ne sufiĉe aprezas tiun fakton.

Do, la ĝenerala kaj abstrakta palavrado de tiuj Esperanto-propagandistoj estas ne nur embarasa kaj ridinda, sed ankaŭ komplete sensenca. Bedaŭrinde, eĉ UEA, kiu subtenas tiujn sloganojn, kaj certaj Eo-amaskomunikiloj remaĉas ĝin.

Tiel longe ke la Eo-movado disvastigas tiajn absurdaĵojn, ĝi neniam estos serioze konsiderata de la homaro. Ĝis 1989 ankoraŭ eblis fari tian propagandon, sed poste ne plu. Bedaŭrinde ekzistas ankoraŭ sufiĉe multaj homoj (ĉefe esperantistoj), kiuj kredas tiun fatrason, disvastigitan de demagogiaj Eo-ĉarlatanoj, kiuj ankoraŭ troviĝas en diversaj landoj kaj havas sufiĉe grandan influon en la Eo-gazetaro. Iliaj nomoj estas ĝenerale konataj.

aK, julio 17

www.planlingvoj.ch